


# PONTO ☆

*Jaro 4 N-ro 3 (23b) Organo de Sunda Esperanto Agado aug. 2005*

## Unu-taga paroliga kurso por la SEA-regiono

**en Malmö sabate la 19-an de novembro inter 10-16 h.**

Partoprenu la kurson kaj parolu pli libere dum la jubilea kongreso venontjare!

Gvidanto: Ann-Louise Åkerlund.
Ni preparos etan lunĉon je malkara kosto.
Aliĝu al Karin tel. 040-98 01 20 aŭ
karin-lindquist@telia.com
Per-Olov tel. 040-26 31 94
**Rimarku ke la dato estas ŝanĝita.**

## La 9-a SEA-kunsido okazos en Malmö

**la 22-an de oktobro 11.00 h.**

Se vi havas proponojn pri diskutpunktoj bonvolu sendi tiujn al Karin Lindquist. En Ponto n-ro 4 ni publikigos la tutan tagordon.

**Rezervu la tagon!**

## Jubilea kongreso 2006

La preparlaboroj pri la venontjara kongreso en Malmö pluiras. Dum la UK en Vilnius Ileana Schröder kaj mi renkontis kelkajn interesajn personojn kaj interkonsentis kun ili prelegi kaj distri dum la kongreso.
Iom post iom ni ĝisdatigos la retpaĝon kun informoj pri la kongreso. Se vi interesiĝas rigardu ĝin!

**www.agado.net**

## Internacia Tago de Kopenhago 27-an de aŭgusto inter 12-18 h.

Ĉe Peblinge Dosseringen/Dr.Louises Bro. La Esperantokluboj dividas budon kun Jugoslava Asocio.

## Seminario en Esperantogården

**16-18 septembro**
Esperanto-Instituto kunlabore kun Finna Esperanto-Asocio. ”Esperanto en literaturo kaj muziko en Finnlando kaj Svedio”
Informas: Lars Forsman tel. 0586-548 11, larsespo@yahoo.se,
Bertil Andreasson 0415-501 52

## Kultura nokto en Kopenhago.

**okazos la 14-an de oktobro**
En ”Huset i Magstræde” (Rådhusstræde) estos esperanta aranĝo en la Salono K. La aranĝo konsistas el ekspozicio de gazetoj, libroj, afiŝoj, ktp kaj ankaŭ diskuto pri esperanto kun vizitantoj. La aranĝo estas malferma je la 18.00 ĝis 24.00. Ĉiuj estas bonvenaj partopreni.
Amike Bent

## Nova prezidanto de SEF

Dum la jarkunveno de Sveda Esperanto-Federacio elektiĝis nova prezidanto Bengt-Olof Åradsson de Nynäshamn. Li estas estrarano de KELI kaj redaktoro de ĝia gazeto ”Dia Regno”. Bengt-Olof iam loĝis en Lund kaj lernis esperanton ĉe Olle Olsson.

Nästa **Ponto**, nr 4
utkommer ca 14/10
Skicka allt material till
*Karin Lindquist*
senast den 1.10

*Sunda Esperanto Agado*
Reto de la Esperanta kunlaboro en la Sunda regiono

Redaktionskommitté/*redakta komitato:*
**Kontaktperson:** *Karin Lindquist* *karin@agado.net*
Sergels väg 14A, SE-217 57 Malmö +46 40 98 01 20
Övriga/kromaj anoj: Sten Svenonius (paĝaranĝo), Johan Svenonius (tekniko), Per-Olov Johansson (presado),



ISSN 0907-127X

# La Folio

Klubo Esperantista de Malmö

*Jaro 76 N-ro 3 (692)* >>Ĉiam antaŭen<<

Fondita en 1906


BRITA SJÖBLOM
mortis la 6-an de julio 84-jara.
Jam en la jaro 1948 ŝi membriĝis en nia klubo kaj partoprenis en la junulara ”Sablokesto”.
Ankaŭ en la kluba laboro ŝi estis aktiva dum multaj jaroj. Ŝi ripozu en paco.



Gertrud Lund

## Tagordo 7.9 de KEM

1. Elekto de protokolkontrolanto
2. Diskuto kaj decido pri la aŭtunaj kursoj
3. Diskuto kaj decido pri la aŭtunaj programeroj
4. Eventualaj elektoj
5. Abono je esperantogazetoj
6. Raportoj kaj informoj
7. Ceteraj demandoj

**La printempa festo 16.4**
estis bele kaj bonguste aranĝita de Karin Rylander, Maria Rebeggiani kaj Per-Olov Johansson.
Post la manĝo ni vorte kaj bilde spertis kiel Asta Schaedel kaj Agneta kaj Gertrud Lund faris kulturhistorian vojaĝon al Egiptio pasintjare. En Kairo ili admiris i a la piramidojn kaj la orplenan muzeon, kaj post flugo al Aswan ili spektis la Nasserlagon, templojn kaj la tombojn en la Valo de la Faraonoj. Ili ankaŭ faris 3-tagan krozadon sur la Nilo.

**27.4**
Ni nin distris farante ŝercdemandojn unu al la aliaj kaj krome divenante pri bildoj de antikvaj objektoj.

**11.5** Sub prezido de vicprezidanto Per-Olov Johansson la lasta kunsido de la sezono okazis.
La kurso gvidata de Kjell Persson komencos la 19.9 je la 15-a h.
Se iuj sin mendus al semajnfina kurso por komencantoj Sten Svenonius gvidos ĝin.
La programeroj por la aŭtuno estis diskutitaj kaj deciditaj. Vidu sur paĝo 5.


Malmö Esperantoförening
*Kronetorpsg 94, SE - 212 27 MALMÖ*
☏ 040-18 71 90
Poŝtĝiro: 3 87 14 - 2

Prezidanto:
*Sten Svenonius sten@agado.net*
☏ 040-19 14 77


**Protokolo ĉe la jarkunsido de KEM la 9-an de marto 2005.**

**1.** La prezidanto Sten Svenonius malfermis la kunsidon kaj bonvensalutis la partoprenantojn.
**2.** La tagordo estis aprobita.
**3.** Ĝustigo de listo de elektantoj okazu nur se bezonate.
**4.** Laŭstatuta anonco de la jarkunsido estis aprobita.
**5.** Kiel protokolkontrolanto estis elektita Karin Lindquist.
**6.** La jarraporto de la estraro estis prezentita kaj komentita de la prezidanto kaj kasisto kaj aprobita de la kunsido.
**7.** La revizora raporto estis laŭtlegita kaj aprobita.
**8.** La estraro ricevis malŝarĝon por 2004.
**9.** Kiel prezidanto por la jaro 2005 estis elektita Sten Svenonius.
**10.** Elekto de 2 estraranoj kaj anstataŭanto por 2 jaroj: Alf Mobark kaj Gerd Rodén respektive Kjell Persson
**11.** Elekto de revizoroj kaj anstataŭantoj: Evert Rausek kaj Ulla Ullfors respektive Agneta Lund.
**12.** Elekto de studkomitato kaj studsekretario: Agneta Lund (sekretario), Kjell Persson kaj Sten Svenonius.
**13.** Elekto de informa komitato kaj informa sekretario: Per-Olov Johansson (sekretario), Agneta Lund, Alf Mobark kaj Albert Vel.
**14.** Elekto de programkomitato kaj programsekretario: Gerd Rodén (sekretario), Gertrud Lund kaj Asta Schaedel.
**15.** Elekto de diversaj funkciuloj:
Redakta komitato por La Folio: Karin Lindquist, Sten Svenonius, Per-Olov Johansson, Ulla Ullfors kaj Albert Vel.
Bibliotekisto: Åke Palm
Bild- kaj fotokomitato: Alf Mobark kaj Per-Olov Johansson
Komputilaj aferoj: Johan Svenonius.
Gazeteltondantoj: Karin Rylander por SDS, Albert Vel por SkD kaj Ulla Ullfors por Ystad Allehanda
Kolektanto de eltondaĵoj: Per-Olov Johansson
Prizorganto de la klubejo: Evert Rausek
**16.** Elekto de elektoprepara komitato: Per-Olov Johansson (kunvokanto) kaj Ulla Ullfors.
**17.** Komitato por la printempa festo la 16-an de aprilo:Karin Rylander (kunvokanto), Maria Rebeggiani kaj Per-Olov Johansson
**18.** Vojaĝkontribuo al la jarkunsidoj de Sveda Esperanto-Federacio kaj Eldona Societo Esperanto por oficialaj reprezentantoj ne plu okazos.
**19.** La kunsido komisiis al la estraro elekti unu oficialan reprezentanton ĉe la jarkunsido de SEF kaj Eldona Societo.
**20.** Propono por la jarkunsido de SEF ne estis.
**21.** Estis raportite pri la preparlaboroj pri la kongreso en Malmö 2006.

**Kursoj**
Literatura kaj konversacia kurso okazas lunde inter la 15.00-16.30 en la klubejo.
La kurso komencos la 19-an de sept. je la 15-a h.
La partoprenantoj parte tradukas la historion de KEM de sveda lingvo al esperanto. Gvidanto Kjell Persson.

Sten Svenonius gvidos semajnfinan kurson por komencantoj se iuj sin anoncus.

**En komputila revuo!**
La svedlingva ’PC FÖR ALLA’ reklamas per grandegaj literoj ’Lernu esperanton en 12 lecionoj’. Sube oni trovas: ”Kurso de Esperanto” www.cursodeesperanto.com.br

Ingrid Näsholm

# Kontaktilo

***Membrogazeto de K.E.K***
***Konversacia Esperantista Klubo***
***Kopenhago***
N-ro 3 (662) 2005 69a-jaro


## Retadreso

Interreta aliro ekzistas en la klubejo ĉiulunde kaj eblas por la klubo sendi kaj ricevi interretmesaĝojn, ĉar nun ni havas interretadreson:

**defakek@hotmail.com**

Rakontu pri tiu adreso al viaj esperanto-rilatuloj. Ni esperas, ke tio faciligos kontakton inter la kopenhagaj esperantistoj kaj la tuta mondo.

La unuan lundon de la monato ni kune vespermanĝas 18.30 - kunportu mem viajn buterpanojn aŭ mendu ĉe Ruth, tel. 36 46 62 79.

**Pri kursoj - jen nia oferto aŭtune 2005:**
**Kursdatoj:** ĉiulunde inter 26/9 kaj 5/12 (legogrupo komenciĝos 15/8)
**Studgrupaj datoj:** 26/9, 10/10, 24/10, 31/10, 14/11, 28/11

**Kursoj:**
**Kurso por komencantoj ĉiulunde** 18.45-19.30 kaj 20.00-20.45

**Kurso por daŭrigantoj ĉiulunde** 18.45-19.30 kaj 20.00-20.45

**Instruantoj:** Regin Larsen, Zita Carbaraviciene, Kim Henriksen

**Legogrupo:**
Arne Casper estras legogrupon ĉiulunde 19.00-19.30 kaj 20.00-20.45

La kondiĉo por partopreni kurson aŭ legogrupon estas membreco de unu el tiuj kluboj: KEK, DEFA Kopenhago, DEJO. Parolu kun la du kasistoj, Karen Olsen (DEFA) kaj Egon Starup-Jensen (KEK)

**Studgrupoj:**
1: Ni daŭrigas la laboron pri la libro de Kolker: 'Vojaĝo en Esperanto-lando' -voĉlegado, tradukado (se necese), diskutado, lingvaj interesaĵoj. Post finlegado la grupo diskutas kiel daŭrigi.
2: 'La iama HCA-teamo' daŭrigas la kunlaboron, ni okupiĝu pri kant-tradukado k.s.
Gvidantoj Bent W kaj Lene.




**Kasisto**
ĝirkonto 2025558
Egon Starup-Jensen
Godthåbsvænget 31, 2.th
2000 Frederiksberg
Tlf: 27378897
E-post:
es-j31@webspeed.dk


**Libroj - periodaĵoj**
En la arkivo de DEFA troviĝas multaj fordoneblaj libroj kaj periodaĵoj (ekz. Monato, Espero) - se vi bezonas legaĵoj por studgrupo, instruado aŭ alia celo, turnu vin al ni, kaj ni sendos liston al vi.
Niemann, Hovedvagtsstræde 9E, 1.
DK-3000 Helsingor
Tel. +45 49 26 13 19
Rete: niemann@mail.dk

**Korekto**
*"Mi gratulas elkore al Bodil Kühlmann pro la tre meritita honorigo.*

*SED en la prezento de ŝia esperantovivo en "Kontaktilo" 2/05 troviĝas grava eraro, kiun mi petas korekti en la plej venonta eldono de "K" :*

*Absolute ne estis Lizeta Kühlmann – kiu ja havas amason da bonaj kvalitoj – kiu tradukis la Noblan Koranon! La tradukinto estas la bedaŭrinde forpasinta itala asekurkomercisto D-ro Italo Chiussi, tiutempe loĝanta en Frankfurt/Main. Li kaj Torben Kehlet interkonsentis, ke Torben eldonu la Koranon en dulingva eldono, kiun Torben produktis en la kelo de nia domo en Nærum en la unuaj jaroj de nia geedzeco. Jarojn poste en Irano eldoniĝis represo.*
*Antaŭdankante pro la korekto,*
*mi salutas vin tre kore kaj amike.*
*Eliza."*



**Jytte, kiu faris la artikolon, respondas:**
Prezentante la reagon, mi ekmemoras la rakonton de Bodil kaj Lizeta, ke temas pri entajpado de La Korano – laŭ manuskripto de la italo – kunlabore kun Torben, kiu sekvis la evoluon. Tiu manlaboro ankaŭ valoras en la projekto. Kaŭzis korespondado inter la aŭtoro kaj la skribanto por celi la korektecon. Mi pardonpetas pri mia informo, ke temas pri tradukado kaj ne entajpado.



# Klubo Esperantista de Helsingborgo



*Ulla Ullfors, Jill Hilford, Helga Holmgren, Lene Niemann, Jan Niemann kiuj partoprenis la ekskurson al Sofiero*

## Karaj klubanoj kaj legantoj,

Bonvenon reen al la esperanta agado ĉirkaŭ la Sundo post plejparte tre varma somero. Komence, tamen, ni iom malesperis pri ĝi. Kiam ni ekskursis al Sofiero estis sufiĉe malvarma kaj pluva vetero. Malgraŭ tio, ni havis tri eksterurbajn partoprenantojn.

Baldaŭ estos tempo denove eklabori, fari novajn planojn kaj strebi realigi ilin. Nia renkontiĝo okazos la 21-an de aŭgusto en Faktorsgatan 5.

Mi esperas ke ĉiuj membroj de nia klubo volas veni kaj doni sian opinion pri nia agado.

Ĝis!Ann-Louise

## www.lernu.net multlingva kursejo de Esperanto kiu celas Esperanto-lernemulojn.

Krom kursoj en diversaj niveloj, ĝi enhavas vortarojn, superrigardon de la gramatiko, laŭtlegitajn rakontojn kun bildoj, prezentojn de Esperanto, tujmesaĝilon, filmetojn, virtualajn lecionojn ktp. Ĝi disponeblas en 24 lingvoj

El "Esperanto revuo", julio-aug.05

---

# La Esperanto klubo de Lund

**Saluton LEK-anoj!**
**Unue pri kluba agado**:
Elstara prelego de Kalle Kniivilä pri Belorusio – historie, geografie, lingve kaj el politika vidpunkto, okazis la 14an de aprilo.
La 12an de majo ni festis naskiĝtagojn de Ulla, Ingegerd kaj Else-Britt. Allan montris filmon pri nia kristnaska festo 2004.

## Belega dimanĉa ekskurso kun ŝanĝiĝema vetero.

La 12an de junio grupeto de LEK-anoj komencis ekskurson direkte al Svarte. Estis la tradicia printempa pikniko, kiu dum la pasintaj jaroj multfoje kolektis esperantistojn el Helsingborg, Malmö kaj Lund ĉe Anna-Maria Lange.

Nia celo ĉi-foje estis Svarte ekster Ystad, kien Kristina Takman transloĝiĝis kune kun Niklas. Survoje pluvetis kaj proksime de Svedala malhelaj, eĉ nigraj nuboj minace pendis super ni. Tamen, subite, kelkajn kilometrojn antaŭ Ystad, la suno penetris la nubojn kaj je alveno ĝi brilis de preskaŭ sennuba ĉielo.



Ni manĝis nian kunportitan lunĉon sur teraso, ĉirkaŭitaj de florantaj arboj kaj arbedoj kaj kun belega mara panoramo.
Promeno sur banstrando por la plej multaj el ni estis la unua ĉi-jare, kaj malgraŭ forta blovo ni plenspire ĝuis. Poste Kristina ofertis kafon, torton kaj glaciaĵon. Ni kantis: Vermlando, vi belega, honore al la gastigantino, Ju pli ni estas kune kaj Knabino de Backafall, kompreneble en belsona esperanto. Anna-Maria nin konatigis kun interesa projekto en Togolando. Kiam ni post la belegaj horoj reproksimiĝis al Lund, la nigraj nuboj revenis kaj la glacoviŝiloj reeklaboris.

**Ulla Saether**

"Fruktito" ĉe Instituto Zamenhof, pri la de Ulla menciita projekto en Togolando. Temas pri Instituto Zamenhof, element- kaj mezgrada lernejo. Ekde septembro 2004 ĝin vizitadas pli ol 200 gelernantoj, kiuj ankaŭ lernas esperanton. Estis iniciato de nederlandaj esperantistoj, tamen poste ankaŭ lernejoj, fondaĵoj kaj entreprenoj, neesperantistaj, kontribuis al la projekto "Lernejo en Togolando". Nova iniciato estas, ke "la gelernantoj fine de marto provis rompi la kutimon manĝi nur por plenigi la ventron, sed ankaŭ por havi bonan sanon". Gbeglo Koffi, ĉefa respondeculo surloke, iniciatis kampanjon pri "Frukto — Fruktovendado"

En majo li sumigis, ke la infanoj pli kaj pli interesiĝas pri fruktoj, ĝis nun bananoj kaj oranĝoj. Ili manĝis ilin frumatene kaj do ne plu rizon, makaroniojn, blankan panon kun spicitaj oleaĵoj. La aĉetado estas subvenciita de IZ, ĉar preskaŭ ĉiuj infanoj diras: "Ni ŝatas fruktojn, sed nia poŝmono ne sufiĉas por ilin aĉeti". Interesa kaj priĝojinda raporto. Eble ni iel kontribuu, tamen, unue ni sendos infanlibrojn.

**Bonvenon al la aŭtuna agadsezono!**
**Anna-Maria Lange**

| | | |
|---|---|---|
| Lunde 15.08 | KEK/DEFA, Kph | Karen prezentos literaturan taskon |
| Dimanĉe 21.08 | KEH. Helsingborg | Klubkunveno |
| Lunde 22.08 | KEK/DEFA, Kph | Rakontu pri esperantolibro legita |
| Lunde 29.08 | KEK/DEFA, Kph | Jan rakontos pri INNOTRANS kaj KAEST - du fervojrilataj aranĝoj |
| Sabate 03.09 | KEM, Malmö | La bicikla grupo informos en la urbo. Bv kontakti Sten Svenonius tel. 040-191477 se vi volas partopreni |
| Lunde 05.09 | KEK/DEFA, Kph | Lars kaj Søren rakontas pri la ĉiutaga vivo, i.a. uzo de diversaj helpiloj al komputilo - kiamanie uzi la reton kiel nevidanto |
| Merkrede 07.09 | KEM, Malmö | Ordinara kunsido. Tagordo sur paĝo 3. Poste raporto pri la SEF-kongreso en Haninge |
| Vendrede 09.09 | KEKG, Kph | "Informfluo en Esperantujo". Prelego de Kalle Kniivilä, Svedio |
| Lunde 12.09 | KEK/DEFA, Kph | Kunportu objekton kaj rakontu pri ĝi |
| Ĵaŭde 15.09 | LEK, Lund | Someraj travivaĵoj - ĉiuj kontribuu! |
| Dimanĉe 18.09 | KEH. Helsingborg | Klubkunveno |
| Lunde 19.09 | KEK/DEFA, Kph | Caro Vladimir - tria kanto. Astrid kaj Erik gvidos nin |
| Merkrede 21.09 | KEM, Malmö | UK en Vilno. Partoprenantoj raportos |
| Lunde 26.09 | KEK/DEFA, Kph | Kursoj kaj studgrupoj - sezonstarto |
| Lunde 03.10 | KEK/DEFA, Kph | Kursoj. Bent Jensenius: Vojaĝo en tempo kaj spaco - diapozitivoj de Kolombio de la 70aj jaroj. Unua parto |
| Marde 04.10 | KEKG, Kph | "De Pythagoras ĝis Descartes". Kulturhistoria vojaĝo tra la eŭklida matematiko kaj ĝia signifo por la hodiaŭa mondbildo. |
| Merkrede 05.10 | KEM, Malmö | Malnovaj filmoj pri nia klubo. Alf Mobark komponis filmpartojn kiujn ni spektos kaj poste montros dum la jubileo |
| Lunde 10.10 | KEK/DEFA, Kph | Kursoj kaj studgrupoj |
| Ĵaŭde 13.10 | LEK, Lund | Raporto pri la 90-a UK en Vilno |
| Sabate 15.10 | KEM, Malmö | Aŭtuna festo. Bengt-Olof Åradsson venos vizite.<br>La novelektita SEF-prezidanto prezentos sin kaj parolos pri la laboro por Esperanto en Svedio. Ebleco fari demandojn. Vidu cemetitan invitilon! |
| Dimanĉe 16.10 | KEH, Helsingborg | Klubkunveno |
| Lunde 17.10 | KEK/DEFA, Kph | Kursoj. Kim montros televidprogramojn |
| Marde 01.11 | KEKG, Kopenhago | "Vasilj Eroshenko—pri la mondkoncepto de la blinda, ukraina Esperanto-poeto kaj verkisto - parto 2<br>Prelego de Alexander Kogan |

# Informoj pri esperantokluboj kaj grupoj de SEA

**Klubo Esperantista de Malmö, K.E.M.**
La kunvenoj komenciĝas je la 18.30 h
en Kronetorpsgatan 94, 212 27 Malmö
Kontaktpersonoj: sten@agado.net
aŭ karin@agado.net
Karin Lindquist,
Sergels väg 14 A, 217 57 Malmö,
tel. 040-98 01 20

**La Esperanto Klubo de Lund, L.E.K.**
Niaj monataj kunvenoj okazos ĉiun duan jaŭdon en monatoj sept.-majo je la 18.30-a h. en la ejo de nia studorganizo SENSUS, Krafts torg 12 A.
Kontaktpersonoj: Anna-Maria Lange,
Bredgatan 27, 222 21 Lund, tel. 046-147309
aŭ rete: Allan Ljungstedt,
allan.ljungstedt@telia.com

**Klubo Esperantista de Helsingborg, K.E.H.**
La kunvenoj okazos je la 14-a horo en Faktorsgatan 5.
Bonvolu informiĝi ĉe Ann-Louise Åkerlund
tel. 042-291262 aŭ 042-186639 (oficejo) aŭ ĉe Barbro Haraldsson tel. 042-121471

**Konversacia Esperantista Klubo Kopenhago, K.E.K.**
Kunvenas en la ejo de DEFA. Vidu la informojn tie. Prezidanto: Kim J. Henriksen, tel. 0045-32 54 93 54. Rete: kek@esperanto.dk

**Kopenhaga Esperanto-Kulturgrupo, KEKG**
Aranĝoj en Medborgerhuset,
Danasvej 30 B, atingebla per buslinio 29 el stacio Vesterport,salono n-ro 1,
dua etaĝo. Pordoj malfermitaj 19.00-23.00.
Ĉiu prelego okazos ĉ. 19.30 – 20.30.
Se vi deziras detalojn pri la prelegoj aŭ havas demandojn pri la aranĝoj bonvolu turni vin al Torben Svendsen, Vanløse Alle 57,
DK-2720 Vanløse. Tel. 0045-38 74 97 64
Persone al la kontaktulo de KEKG:
Torben Svendsen: esperanto@webspeed.dk
Al la asocio - KEKG: kulturgrupo@webspeed

**Fervojista klubo en Kopenhago, DEFA**
Kunvenas lundojn inter 19.30-22.00 en Banedanmark, entreprise, Vasbygade 10.
Por eniri: uzu la sonorilon ĉe la (krd)pordo.
Kontaktulo: Lene Niemann,
tel. 0045-49 26 13 19
Rete: niemann@kabelmail.dk
Kluba retadreso: defakek@hotmail.com

*Hejmpaĝo de SEA www.agado.net*

## KEF – Kultura Esperanto-Festivalo en Helsinki

Peter kaj mi partoprenis Kulturan Esperanto-Festivalon en Helsinki la 16-an ĝis la 23-a de julio, tuj antaŭ la UK en Vilnius. La ”kef-ejo” estis Instituto de Kalliola, kie ni loĝis en klasĉambroj kaj manĝis en la kafejo. La manĝoj estis abundaj kaj bongustaj. Regis familia atmosfero inter la 90-100 partoprenantoj diversaĝaj.

En la altnivela programo estis interalie prezentoj de artistoj kaj verkistoj, prelegoj pri esperanta teatro, muziko, rokliriko kaj krimromanoj, prezento de artista datenbazo en interreto, atelieroj pri poem-, proz- kaj artikolverkado, voĉouzado, danco kaj kreiva esprimo, tradukado kaj vidbenda farado.

En la granda salono ni spektis la teatraĵon ”Familia etoso”, prezentita de Teatro Trupo Tuluzo, ”Vespero de erotika poezio”, prezentita de pluraj el la partoprenantoj kaj kabareda vespero kun pluraj artistoj, inter ili Kim Henriksen kaj lia filo Villads, kiuj prezentis amuzan dancprogramon.

La finna operkantistino (kaj esperantistino) Liisa Viinanen surprizis nin per propra versio de opero: Romeo & Julia de Vilĉjo Ŝekŝpiro. Ŝi metis famajn kantojn kaj ariojn de diversaj aŭtoroj en tute nova kunteksto, kaj faris tion bonege. La tekstojn tradukis Anja Karkiainen.

Ĉiun vesperon estis koncertoj en proksima klubejo de Liberté: Ĵomart, Nataŝa kaj Karina, Dolchamar, Martin Wiese (el Persone), JoMo kaj la Liberecanoj, Alejandro Cossavella kaj la Porkoj, Esperanto Desperado … Krom tio ne povis ĝui (?) Esperanta karaokeo kun vivbando.


***Kim kun filo***

Nu, kelkaj ja kantas pli volonte ol bone.
La muzikistoj tamen bonege elturniĝis en diversaj konstelacioj.

Ni varme rekomendas al vi partoporenila venontan KEF, se kaj kiam ĝi okazus. Ann-Louise